



"La lingva problemo en la eŭropa kunlaboro" estas la titolo de germanlingva prelego de Karl Heinz Müller, membro de la bavara parlamento, kiu okazos

PILO-PRESS

Interŝanĝa Informservo

sabate, 8.5.1976
je la 19,30 horo
en la urbodomo
de Augsburg nome
de Ludwig Zamenhof-Gesellschaft e.V.

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pikel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 18/1976 - 3 majo 1976
Aperas ĉiusemajne

Granda optimismo ĉe la SAT-Amikaro

Bordeaux (pp/satam) - Ne nur optimismon karakterizis la kongreson de la SAT-Amikaro okazinta dum la paska ferio en Bordeaux, sud-okcidenta urbo de Francio, sed ankaŭ bona etoso - eble la fama vino "Bordeaux" iom kontribuis en tio - kaj pli granda partopreno de gejunuloj. Entute 150 esperantistoj renkontiĝis, inter kiuj 20 ne-francoj kaj 40 gejunuloj.

Unu el la plej gravaj novaĵoj estis la decido pri reeldono de la "Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Granda Vortaro Esperanto-Franca) de G. Waringhien, kun ŝplémento, sub la ŝildo de SAT-Amikaro.

Okazis debato pri "regio-nismo kaj sennaciismo", kaj ankaŭ informkunveno pri Esperanto je la servo de la laboristoj, kun ĉeesto de reprezentantoj de la socialista partio kaj de la anarkiistoj.

La gazeto "Sud-Ouest" aperigis foton kaj artikolon sufiĉe longan kaj objektivan kun la adreso de la asocio kaj tiu de la respondeculo de la loka laborista rondo. Ankaŭ la loka radiostacio longe intervjuis kelkajn partoprenantojn.

Tamen estis malhela punkto: la rilatoj kun la neŭtrala Esperanto-movado. Ekzistas lokoj, kaj eĉ regionoj, kie lojala kunlaboro estas regulo, kaj ĉio iras glate je la profito de ĉiuj. Sed, male, okazas ankaŭ, ke iuj ambicias subtaksigi la rolon de SAT-Amikaro, fari el ĝi fakon de la neŭtrala Esperanto-movado aŭ tiri profiton el ĝiaj sukcesoj kaj atingoj. Tiu senkonsekvenca sinteno povas nur endanĝerigi la ĝeneralajn rilatojn kun la neŭtrala movado kaj konduki al drastaj reagoj. SAT-Amikaro estas intime ligita kun SAT, kun kiu ĝi kunlaboras sur diversaj terenoj en la franclingvaj landoj. Ĝi ne celas konkurenci la neŭtralajn organizojn, ĝi eĉ deziras al ili multajn sukcesojn.

La distraĵ programoj estis pli riĉaj ol lastjare: teatraĵo "Andromaka" de Racine, dancoj de Provenco, Irlando kaj Argentino, skeĉoj, ktp.

La 32-a kongreso de SAT-Amikaro okazos dum pasko 1977 en Bédarieux, en suda Francio, iom norde de Béziers. (Gazetara Servo de SAT-Amikaro)

Internacia studsemajno en Finnlando

Vääski (pp) - De la 10-a ĝis la 18-a de julio 1976 okazos en Vääski, Finnlando, en feriejo de maristoj, internacia studsemajno por evoluigi la lingvouzon de Esperanto kaj plimultigi la sciojn kaj kapablojn de Esperanto-parolantoj, por profundigi la internacian kunsentadon kaj flegi homajn kontaktojn trans ĉiajn limojn, kaj por freŝigi en natura parko kaj lagoĉirkaŭaĵo.

El la programo: Elementa kurso, daŭriga kurso, konversaciaj grupoj, kulturaj okazaĵoj ktp.

Instruos Else Rasmussen, Danlando, Milvi Myyrisepp, Estonio, Hemmo kaj Veera Tietti, Finnlando.

Petu informojn de Internacia Studcentro Isce, SF-17300 Vääski, Finnlando.

Nun entuziasma esperantisto

Paderborn/Berlin (hb/pp) - La ĝisnuna prezidanto de la Asocio pri Programita Instruado (GPI) kaj ties nuna estrarano, prof. d-ro Uwe Lehnert de la Pedagogia Altlernejo Berlin, partoprenis intensan kurson pri lingvo-orientiĝa instruado kaj la bazaj reguloj de Esperanto, kiun gvidis komence de la somera semestro prof. d-ro Helmar Frank en Berlin.

Post la kurso prof. d-ro Lehnert decidis gvidi la sciencan akompanadon de la projekto en Berlin kaj eklerni Esperanton laŭ la lernolibro "Esperanto Programita" de Hermann Behrmann.

La 21-an de aprilo 1976 li skribis al la verkinto, samtempe prezidanto de la Eŭropa Klubo en Paderborn:

"Kara s-ro Behrmann, mi partoprenis la intensan kurson de s-ro Frank komence de aprilo, kaj mi fariĝis entuziasma ano de Esperanto. Bonvolu sendi al mi vian instruprogramon kaj la diskojn. Bv. sendi ilin al la adreso de la Instituto pri Kibernetiko. Oni tuj pagos. Kun afablaj salutoj Uwe Lehnert."

Renmin Ribao pri Esperanto-vizito

Pekino (pp) - En la tutĉinia ĉefa ĵurnalo "Renmin Ribao" de la 25-a de aprilo 1976 estis publikigita jena de la ĉina presagentejo "Jinhua" disvastigita informo:

"Vespere la 23-an de aprilo k-do Je Lai-ŝi, la vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, aranĝis bankedon por bonvenigi s-ron Woessink, la estraranon de Universala Esperanto-Asocio, kaj lian edzinon. K-do Ĉen Juan, la ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj aliaj gekamaradoj ĉeestis la bankedon. Gesinjoroj Woessink atingis Pekinon vespre la 22-an de aprilo."

Gesinjoroj Woessink nuntempe restadas en Japanio, la naskiĝlando de s-ino Woessink-Nagata.

Esperanto-Junularo kolera je Sandra

Den Haag (pp) - La frazo "Esperanto-Junularo kolera je Sandra" aperis kun grandaj literoj en la haga gazeto "Het Binnenhof" de la 10-a de aprilo 1976.

Kio okazis en Hago? La trian de aprilo okazis la internacia kantfestivalo. Preskaŭ ĉiu kantisto kantis en la angla lingvo anstataŭ en sia propra gepatra. Ĉu tio ne estas malĝusta situacio?

Kelkaj junaj nederlandaj esperantistoj atentigis la homojn pri tiu afero. Antaŭ la enirejo de la kongresejo, kie okazis la festivalo, ili disdonis mil flugfoliojn kun jena teksto:

"La kantado de nederlanda kontribuo al la internacia kantfestivalo en la angla lingvo, nek estas nacia, nek internacia, sed esprimo de angla-usona kultursuperregado."

Tiun frazon oni tradukis en 12 lingvojn: nederlanda, franca, germana, hispana, greka, serbokroata, finna, norvega, portugala, angla novhebrea kaj itala, la lingvoj parolataj de la partoprenintaj kantistoj. Multaj eksterlandaj gastoj kaj ĵurnalistoj kun ĝojo rigardis la tekston kaj tralegis ĝin, kiun ili ja povis legi en sia propra lingvo!

Ankaŭ al multaj nederlandaj gazetoj estis sendita gazetara informo. "Het Binnenhof" aldonis mem: "Por kantfestival-prezentistino, kiel ekzemple Corry Brokken, estus facile se Esperanto iĝus la ĝenerala komunikad-lingvo, tiam ŝi ne plu bezonus balbuti en la angla kaj franca lingvoj."

Kolera je Sandra (daŭrigo)

Pasintan jaron la svedoj ankaŭ protestis kontraŭ la forta angla-usona influo en la kantfestivalo. Kaj kion ni faru en 1977?

Cetere, Sandra estis la nederlanda reprezentantino en la festivalo.

Ineke Emmelkamp

Germana Esperanto-Ekspozicio Augsburg 1976

La vigla intereso daŭras - jam pli ol 1 500 vizitantoj

Augsburg (pp) - La urbodomo de Augsburg en ĉi tiuj tagoj fariĝis la Esperanto-Centro en Germanio. Preskaŭ ĉiutage alvenas inter 100 ĝis 200 vizitantoj, ne nur el Augsburg, sed ankaŭ el aliaj urboj de Bavario kaj FRG. Ankaŭ jam multaj eksterlandanoj, ekz. el Usono, Japanio, Indonezio, rigardis la imponan ekspozicion.

Ankaŭ per la poŝto alvenis informpetoj pri Esperanto, el bavaraj urboj kaj eĉ el la regiono de Bremen.

Vere, oni parolas pri Esperanto en Augsburg, Bavario kaj FRG dank' al la ekspozicio. Tre favoran artikolon disvastigis dpa (Germana Presagentejo), kiu aperis i.a. en Handelsblatt, Düsseldorf, kaj Rheinzeitung, Koblenz.

Ĝis dimanĉe, la 2-an de majo, vespere, la ekspozicio ^{vizitis} 1.506 personoj, multaj el ili faris demandojn kaj ofte okazis interesaj diskutoj. Ĝis nun ne estis aŭdita ia aĉa kritiko pri Esperanto. Pri la ekspozicio mem la plej multaj homoj estis forte impresitaj.

La plej surpriza sperto en la ekspozicio estis la pretenco de pli ol 10 % de la vizitantoj partopreni en provlecionoj. 165 personoj, junaj kaj maljunaj, kun intereso sekvis tiajn lecionojn en la urbodoma halo. Kaj 14 personoj ĝis nun enskribigis por Esperanto-kursoj, ankaŭ lernolibroj jam estas disvenditaj.

Bedaŭrinde la striko de la presistoj dum la pasintaj tagoj malhelpis pluan raportadon pri la ekspozicio. Espereble la situacio baldaŭ ŝanĝiĝos. Cetere, ankaŭ ĵurnalistino de Augsburgener Allgemeine ĉeestis provlecionon, kaj ŝi raportos pri tio, se la gazeto denove aperos.

La teamo de la ekspozicio

Nur malmultaj personoj realigis tiun unikan ekspozicion. Iuj havis la ideon, aliaj ekkomencis labori kaj 5 - 6 fervoruloj ĉiutage deĵoras. Jen la nomoj de la organizantoj kaj deĵorantoj (en alfabeto ordo):

S-ro Ipfelkofer Josef Maria, Augsburg
S-ro Kratzmann Rudolf, Augsburg
S-ino Schmid Margarete, Augsburg
S-ro Schmid Hermann, Augsburg
S-ino Tucker Stefanie, Augsburg
S-ro Tucker Gerald, Augsburg
S-ro Weidacher Josef, München
S-ro Pickel Ludwig, Nürnberg

Dum kelkaj tagoj ĉeestis ankaŭ f-inoj Hartwig Anny kaj Hofmann Gunda el Nürnberg.

La ekspozicio estas malfermata ĉiutage de la 10-a ĝis la 18-a horo. Ĝi daŭros ĝis la 9-a de majo 1976.

-.-.-.-.-

Ĉu vi volas konatiĝi kun la "Gaja Forĝisto" de Augsburg?

Mendu tuj la libreton "La Gaja Forĝisto" de Hermann Schmid

Prezo 3,90 DM

Havebla ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1
PSchK Nürnberg 819 56-851

Deklaro pri Esperanto en la Bavara Televido

Augsburg (pp) - Ni jam informis, ke okaze de la malfermo de la Esperanto-Ekspozicio en Augsburg ĉeestis la Bavara Televido, kiu raportis dufoje pri la ekspozicio sabate, la 24-an de aprilo.

En la elsendo kadre de la Tria Programo, je la 19,45 horo, Rudolf Kratzmann, Augsburg, faris jenan deklaron en Esperanto, kiu samtempe estis laŭtleĝita en germana lingvo:

"Kio estas Esperanto?"

Esperanto estas la internacia lingvo, kreita antaŭ 89 jaroj de la pola okulkuracisto d-ro L. L. Zamenhof.

Per la multnombraj parolantoj kaj adeptoj en la tuta mondo fariĝis Esperanto vivanta lingvo.

Kion volas Esperanto?

La Internacia Lingvo volas kiel dua lingvo por ĉiu homo venki la lingvajn barojn kreitajn per la naciaj lingvoj.

Esperanto volas plifaciligi la multflankajn internaciajn rilatojn kaj kontribui al vera kompreniĝo inter la popoloj kaj homoj.

Esperanto tamen ne volas forigi la ekzistantajn lingvojn. Male! Lernejoj eksperimentoj pruvis, ke la scipovo de Esperanto estas bona bazo por la ellerno de aliaj lingvoj. "

Cetere, Rudolf Kratzmann, elegantmaniere gvidis tra la programo de la kultura vespero en Augustana-domo, pri kiu ni jam mallonge raportis.

Kion pensas Augsburganoj pri Esperanto?

Jam en la pasinta numero de Pilo-Press ni publikigis eltranĉaĵojn pri intervjuoj kun loĝantoj de Augsburg pri la temo: Kion vi komprenas sub la vorto "Esperanto"?

Hodiaŭ ni publikigas la tradukojn de tri intervjuoj:

- 1) S-ro Reinhard Fritz, reallerneja instruisto:
Tio estas internacia lingvo, kiu servas al interkompreniĝo de la popoloj. Mi trovas la ideon sufiĉe bona, sed ellerni mi ne volus ĉi tiun lingvon. Mi pensas, ke oni scias sin aranĝi pli bone per la angla aŭ la franca lingvoj.
- 2) S-ro Rudolf Kratzmann; 2-a estro de la Esperantogrupo Augsburg:
Tio estas la sola ebleco sur neŭtrala bazo doni al la popoloj interkompreneblon. Mi okupas min kun tiu lingvo ekde la jaro 1947 kaj mi estas entuziasmigita de ĝiaj strukturo kaj fonetika prononcado.
- 3) S-ino Evelyne Regnat, hejmmastrino: Jes, tio estas mondlingvo, kiu devas pliprosimigi la popolojn. En tio mi vidas la esencan taskon de tiu internacia lingvo. Bedaŭrinde mi havas tre malmulte da libera tempo; alie mi estus tre interesita ellerni Esperanton.

(La tradukon faris R. Kratzmann)

Esperanto en Radio

Pro la deĵorado en la ekspozicio en Augsburg mi ne havis ofte eblecon dum ĉi tiuj tagoj aŭskulti al la Esperanto-elsendoj. Tamen kelkfoje sonis ankaŭ la Varsovia voĉo tra la ekspozicia halo. Ni aŭdis ekzemple la dimanĉan Esperanto-Ekspreson kun memoriga felietono pri Hilda Drezen, kun intervjuo kun N. Aleksiev kaj la rubriko "Novaĵoj de Pilo-Press", en kiu oni laŭtleĝis la leteron de federacia ministro Helmut Rohde pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso. El leterkesto ni eksciis, ke ĝis fino de aprilo al la Esperanto-Redakcio jam alvenis 2000 korespondaĵoj en ĉi tiu jaro. - Interesa denove estis la programo el Vieno, kiun mi aŭdis en Nürnberg, dimanĉe, la 1-an de majo.